# Antaŭvido por la Instruisto

**Unuo oka**

| *Sociaj funkcioj kaj temoj* | *Kiel diri* | *Lernotaĵoj* | *paĝoj* |
|---|---|---|---|
| interkonatiĝo kun novaj klaskolegoj | - | | 7 |
| orientiĝi en trafiko | — Ĉi tiu estas unudirekta vojo. | orientiĝo en trafiko | 8-11 |
| esprimoj | — Nu! Ĉu vere? Bele!<br>— Ne! Tute ne! Vi pravas! | sufiksoj **ig**, **iĝ** | |
| orientiĝi en la urbo | — Ĉu vi kapablas legi mapon? | legado kaj orientiĝo per mapoj | 8-13 |
| proponi / akcepti ion | — Ĉu vi akceptas...? | manĝaĵoj kaj trinkaĵoj<br>ekzercaro pri la revizio<br>prepoz. ĝenerala enkonduko<br>prepoz. **al, antaŭ, apud, de, dum, en, ĝis, inter, je, kun, laŭ, per, post, sen, sub, sur** | 12<br>128-129<br><br><br>14-16 |
| ekzerci parol-fluecon per kantado | | Saluton, Suno!<br>Adiaŭ al Val-vilaĝo | 17<br>25 |
| demandi pri informoj | — Kion vi vidas per la binoklo? | La korelativa sistemo | 18- 24 |
| konversacii pri la vetero kaj sezonoj | — En Printempo la floroj.... | prepozicio **dum** | 26 -27<br>131 |
| opinii pri la vetero | — Mi kredas, ke baldaŭ pluvos (certe, eble, se..) | veteroj, klimatoj kaj sezonoj<br>varme/malvarme... | |
| konversacii pri la horo | — Kioma horo estas?<br>— Kiam vi...? | horloĝa terminaro | 28-29 |
| konversacii pri la tempo | | adverboj: **poste, baldaŭ, tuj, ekde** | |
| konversacii pri la partoj de la tago kaj ĉiutagaĵoj | — Je kioma horo vi... | ĉiutaga rutino | 29-30<br>132 |
| konversacii pri ofteco | — Kiel ofte vi vizitas la dentiston? | oftec-adverboj | 30 |
| pri kalendaroj | | kalendaroj tutmondaj | 31 |
| | | prepozicioj, daŭrigo<br>prepozicioj: **anstataŭ, ĉirkaŭ, ekster, el, kontraŭ, po, por, pri, pro** | 32-33 |
| | | korelativoj, ekzerco<br>teksto: La jubilea libertempo<br>teksto: Somera vojaĝo | 34, 133<br><br>134 |

Instruisto, propono pri enir-ekzamenoj skriba kaj parola por kontrolo de nivelo de kandidatoj al libro 2, se vi taksos tion utilan, troviĝas en via helpa teko (ht 2, paĝoj 1 ĝis 4), je www.lernejajklasoj.net

La numeroj de la paĝoj en la plej dekstra kolumno referencas la lernantan libron kaj la helpan tekon.

Instruisto,

estas formularo por enir-ekzameno al ĉi tiu instru-nivelo, en via helpa teko.

Vidu retadreson en la antaŭa paĝo.

# Varmigilo - interkonatiĝo

**1** **Intervjuu kolegon** kaj skribu ŝian/ lian respondon.

NV *(Vidu paĝon 148.) celo, dungo,* ***eco****, esperantu****mi****, evit****inda****, fraŭla, nuna, ŝat.besto*

Persona nomo ........................................ familia nomo .......................... karesnomo ........................

Naskiĝ-loko ..........................................................................................................................

Nacieco ..........................................................................................................................

Nuna adreso ..........................................................................................................................

Kiel longe ŝi/li loĝas en tiu adreso? ............................ ret-adreso ........................................................

Urboj, kie vi loĝis antaŭe ..........................................................................................................................

Ĉu fraŭla? —— jes —— ne

Ĉu havas infanojn? —— jes —— ne

Nuna okupo ..........................................................................................................................

Lernejo / universitato ..........................................................................................................................

Ŝat-okupoj (hobioj) ..........................................................................................................................

Kial vi lernas Esperanton? ..........................................................................................................................

Kiam vi komencis lerni Esperanton? ..........................................................................................................................

Kiel vi esperantumas nuntempe? ..........................................................................................................................

Aliaj fremdaj lingvoj bone parolataj de vi ..........................................................................................................................

Preferata manĝaĵo ..........................................................................................................................

Ŝat-besto plej ŝatata ..........................................................................................................................

Besto plej malŝatata ..........................................................................................................................

Plej admirata heroo ..........................................................................................................................

Plej grava inventaĵo de la homaro ..........................................................................................................................

Plej indaj personaj ecoj viaj ..........................................................................................................................

Plej evitindaj personaj ecoj viaj ..........................................................................................................................

Ĉefaj viv-ambicioj / viv-celoj ..........................................................................................................................

**2** Kiam vi finos, **ŝanĝu viajn rolojn** de intervjuanto al intervjuato.

**3** Kiam vi ambaŭ finos, trovu liberan kolegon kaj **raportu** al li/ŝi pri la ĵus intervjuita kolego:


— Ĉi tiu estas... Li/ ŝi diris al mi ke ..........................................................................................................................

7

Celoj de tiu ĉi varmigilo: interkonatiĝo, ekzercado per la ki-vortoj; progresigo de la parolflueco; ekzercado de raporta parolo: “Ŝi diris ke... “

# (revizio de la unua libro)

MAPO DE ESPERANTO-URBO




**lernotaĵoj:**

revizio de la unua libro

**gramatikaĵoj**

akuzativo pri celo de movo: tien, dekstren, suden...

sufiksoj **ig, iĝ**

**temoj**: Ampleksigo de vort-provizo pri...

**celoj**: plifirmigi ĵusajn kaj antaŭajn lernitaĵojn.

paroligi ĉiun lernanton individue, por akceligo de parol-flueco.

8

8 (numero griza interna) - numero de la paĝo de la porlernanta libro, por faciligi al vi la komunikadon kun viaj lernantoj.

**laŭpaŝe**:

1. Esploru kun la lernantoj la bildojn.

Kiuj estas tiuj homoj? Kion ili faras? Kiu estas tiu homo en la ruĝa aŭtomobilo?

2. Post atenta esplorado de la bildoj, la lernantoj kreu naci-lingvan dialogon pri ili.

3. Poste la lernantoj atentu la sontekston, sen la skriba teksto.


4. Sekve ili aŭskultu / sekvu silente la skriban tekston.

5. Poste vi esploru kun ili la novajn vortojn.

# Trafika *mal*ordo

Valmor Franca proponas al Margo Lopes vetur.adon al ŝia banko, sed Margo konkludas ke piede ŝi pli rapide iros.

**1** Kio okazas? Ludu duope. **Esploru** atente la bildon sube kaj **el.pensu** naci.lingvan dialogojn por la situacioj A, B kaj C.




53 **2 Atentu la dialogojn.**



53 (blue, apud la ikono pri aŭdado) - numero de la sontrako en la disko.

53

**3 Aŭdu refoje**, dum vi sekvas silente la tekstojn.

**A**

**Val** Margo!
*Margo* O! Val... Saluton. Kiel vi fartas? Pardonu min, ĉar mi hastas. La banko fermiĝas en dek-kvin minutoj.
**Val** Ĉu via banko situas proksime?
*Margo* Jes. Nur tri blokojn antaŭe. Je Privat Strato.
**Val** Bone, envenu do. Mi veturigos vin.
*Margo* Ĉu vere? Ĉu vi ne devojiĝos pro mi?
**Val** Ne. Tute ne. Via kunesto plezurigos min.
*Margo* Vi estas tre ĝentila. Dankon, kara!
Val Ne dankinde.




**B**

*Margo* Bele! Kia bela aŭto!
**Val** Fakte. Ĝi apartenas al mia frato Maŭritiŭs. Li vojaĝis feriade unu monaton. Nu... Mi kontrolu... Privat Strato... Ĉu ĝi situas **en tiu direkto?**
Margo Jes, ĝuste.Turnu la aŭton **dekstren** je la dua strat -angulo.
**Val** Ne eblas.Tiu strato estas unu-direkta.
*Margo* O! Vi pravas. Nu, turnu **dekstren** je la venonta strat-angulo.
**Val** Ni estas en la malĝusta trafik-linio... Eble mi sukcesos manovri ...

**C**

Taksiisto Kion vi faras, idioto?! Ĉu vi freneziĝis?!
**Val** Aĥ! La trafiko estas terura hodiaŭ!
*Margo* Nu! Mi kredas ke piede mi pli rapide iros. Permesu min eliri. Dankon pro la provo helpi min. Ĝis revido, Val!

**4 Ekzercado**

a **Esploru** kun via instruisto la novajn vortojn, sube.
b **Ludu** la dialogon kun via instruisto, laŭ ŝia/lia indiko.
c **Ludu** aktorece la dialogon kun klaskolegoj. **Atentu kaj atentigu** pri klara kaj bela prononco.
ĉ **Aktorado** - Stariĝu. Rol-ludu duope la dialogon antaŭ la klaso. **Uzu vian tutan korpon**, kiel bonaj aktoroj. Rigardu rekte al via partnero. Uzu viajn veraj nomojn.

NV *(Vidu nun paĝon 148.) atenti**gi**, ĉar, de.voji**ĝi**, el.iri, en.veni, fermi**ĝi**, frenezi**ĝi**, hasti, Jes, ĝuste! kun.esto, manovri, Ne eblas. Nu!, partnero, plezuri**gi**, provo, **re**foje, strat.angulo, unu-direkta, ven.onta, veturi**gi**, Vi pravas!*



**laŭpaŝe**:

6. Invitu lernanton ludi kun vi, instigante lin/ŝin al ŝajnigo de la sugestita etoso, por aktorece rol-ludi la dialogojn.

7. Poste vi ludu kun la tuta klaso. (Vi estu unu el la roluloj kaj la klaso estu la ceteraj.)

8. Poste la lernantoj ludu duope / triope kun apudaj kolegoj.

9. Starante, ili aktorece rolludu la tekston antaŭ la klaso.

**Ĉiam aktorece**, rigardante rekte al la partnero.

Esploru sufiksojn **ig** kaj **iĝ**.

**5** Ĉu vi bone komprenis? **Skribu** false aŭ vere.

a Margo ne hastas. (                    )
b La banko de Margo situas je Privat Strato. (                    )
c La aŭtomobilo apartenas al la kuzo de Val. (                    )
ĉ Val povas turni la aŭton dekstren. (                    )
d Margo marŝos ĝis la banko. (                    )
e Val estas bona stir**ist**o (ŝoforo). (                    )
f La trafiko estas **mal**trankvila. (                    )

**6 Kiel diri**

Nu!
Nu ...
Vi pravas.
Prave!
Idioto!
Ĉu vi frenez**iĝ**s !?
Ĉu vere?
Bele!
Ne! Tute ne!

**7 Restudu** la esprimojn pri lokiĝo kaj direktoj en la memorigilo de la sekvonta paĝo. Ni studis ilin en paĝoj 72-78 de libro unua. Ni bezonos ilin nun por fari ekzercon 8, sube.



Kie situas ...?

Granda Hotelo
Librejo de Bruno
Urba Biblioteko

**8** ***Paroligilo*** pri lokiĝoj kaj direktoj.

**Ludu duope.** Imagu ke vi kaj via partnero (klaskolego) estas tiuj du homoj ĉe la motorciklo.Vi staras antaŭ la Ĉefa Kongresejo, laŭ la mapo de Esperanto-urbo, je paĝo 8.

**Demandu kaj respondu** al via partnero pri direktoj al la konstruaĵoj listigitaj en la kadro, supre.

11

## Memorigilo el libro unu - lokiĝo kaj direktoj al konstruaĵoj.

**A** Permesu min, sinjoro, ***kie situas*** la banko, bonvolu?
B Ĝi situas en tiu direkto, ***inter*** la kvara kaj la kvina avenuoj, ***proksime al*** la ĉefa bus-haltejo.
**A** Kiel mi povus atingi ĝin?
B Vi marŝu ***ĝis*** la strat-angulo kaj turniĝu ***maldekstren***. Iru ***rekte*** du blokojn, ***laŭ*** Dua Avenuo kaj turniĝu ***dekstren***. Marŝu tri pliajn blokojn, ***laŭ*** Komerca Strato. La banko situas ***maldekstre***. Ĝi situas ***fronte al*** la homeopatia apoteko, ***inter*** la kvara kaj la kvina avenuoj.

La poŝt-oficejo situas ***je*** Dua Avenuo. Ĝi situas **inter** la stratoj Komerca kaj Supra. ... ***fronte al*** la Okcidenta Parko. ... ***apud*** la restoracio de LyJuping. ... ***ĉe*** la angulo de Dua kun Supra.

### *Paroligilo 1*

Ĉu nutr**aĵ**o, frand**aĵ**o aŭ trink**aĵ**o?

**Ludu triope**. Imagu ke vi kaj viaj du kolegoj estas en kafejo.
**Proponu** al ili ion por manĝi aŭ trinki. **Faru** demandojn kiel:

Ĉu vi akceptas ................................ ?
Kion vi opinias pri ............................ ?

**A** Ĉu vi konas pekion?
B Ne. Kio ĝi estas? Kia estas ĝia gusto?
**A** Ĝi estas frukto tre bongusta. Jen. Gustumu.
B Aĥg !! Ĝi estas tro amara!

**gustoj** - amara, dolĉa, dolĉ.amara,
acida, dolĉ.acida, akra, sensala...

rilataj verboj - ŝati, malŝati, satigi, soifi.

*1. ovoj kun lardo, 2. fiŝaĵo, 3. ŝorbeto,*
*4. suko, 5. sandviĉo, 6. pico,*
*7. bombonoj, 8. papriko, 9. biero.*




## Revizio pri pronomo si

### *Paroligilo 2* - Enklasa kisado

**Ludu kvarope** - Du lernantoj aktoru fruntan kisadon, dum du aliaj lernantoj demandas kaj respondas:

-- Ĉu li kisis ŝin? -- Ĉu ŝi kisis lin? -- Ĉu li kisis **sin**? -- Ĉu ŝi kisis **sin**? -- Ĉu ili kisis **sin**?
-- Ĉu ili kisis unu la alian?

**Ludu sesope**

Du lernantoj kisas la frunton al du aliaj lernantoj. Du observantoj demandas kaj respondas:
-- Ĉu ili kisis ilin? ktp

**Hejma tasko** - Iru al paĝoj 128-129 por revizia ekzerco pri libro 1.

**Petu** de via instruisto apartan folion pri revizio de gramatikaĵoj, el ŝia/ lia helpa teko



Ĉu nutraĵo... ?

**Instruisto**, disdividu la skrib-tabulon je tri kategoriojn, nome nutraĵoj, frandaĵoj kaj trinkaĵoj.

La lernantoj proponu aldonojn al la listoj.

***Rimarko pri paroligilo 2***

*En kelkaj naciaj kulturoj estas normale interhoma tuŝado, brakumado kaj vanga kisetado.*

*En kelkaj aliaj kulturoj tio ne estas permesata.*

*Laŭ via decido, la lernantoj faru aŭ ne tiun ĉi ekzercon.*

**iIstruisto**, presu por disdoni ekzercon de paĝo 5 de via helpa teko. (www.lernejajklasoj.net)

**Hejma tasko** - revizio de la unua libro - paĝo 12

**1 Substreku** la verbojn rekte transitivajn kaj **metu la akuzativan N**, laŭ la neceso.

a Mi parolas Esperanton .

b Mi vidas la hundo .

c Mi vidas la hundo .(alia signifo)

ĉ Kio vi trovis ? Mi trovis tiu bela knabino .

d Kie Maria trovis siaj okulvitroj ?

e Li aĉetis du bonaj libroj .

f Hodiaŭ venis dek gelernantoj .

g Kiu vendos la domo ? (Paulo) / Kio vendos Paŭlo ?

ĝ Lidja perdis sia pluv-ombrelo .

h Bonvolu , rigardu mi , mia kara amiko .

ĥ La homoj kiuj diras la vero estas simplaj .

i Mi vidis la virino , kiu vi amas.

j Mi vidis la virino , kiu vi amas.

**2 Verku** demandojn, laŭ la modelo. Uzu **kion** aŭ **kiun**.

a Maria skribis leteron. *Kion Maria skribis?*

b Petro amas sian patrinon. ........................................

c La knabo manĝis bananon. ........................................

ĉ Karlo havas aŭtomobilon. ........................................

d Paŭlo estimas sian instruiston. ........................................

e Agneza fermis la pordon. ........................................

f Mioko amas Paŭlon. ........................................

g Lidja vizitis sian amikinon. ........................................

ĝ ........................................

**3 Forstreku** la akuzativan N el kie ĝi troas:

Mi aĉetis ok maturajn, grandajn, belajn, enormajn, bongustajn bananojn.

128

128 (numero griza interna) - numero de la paĝo de la porlernanta libro, por faciligi al vi la komunikadon kun viaj lernantoj.

**4 Reskribu** la frazojn sube, uzante ĉiujn eblecojn pri vort-ordo.

*Mi estas inteligenta.*

..........

..........

..........

..........

..........

*Mi reskribas inteligentan frazon.*

..........

..........

..........

..........

..........

**5 Transmetu** la gramatikajn finaĵojn el la unua kolumno en la parentezojn de la dua, laŭ iliaj gramatikaj funkcioj.

| gramatikaj finaĵoj | gramatikaj funkcioj |
|---|---|
| J | (   ) akuzativo |
| a | (   ) imperativa modo |
| i | (   ) futuro de la verboj |
| o | (   ) substantivoj |
| u | (   ) prezenco de la verboj |
| n | ( j ) pluralo |
| as | (   ) preterito de la verboj |
| is | (   ) adjektivoj |
| os | (   ) kondicionala modo |
| us | (   ) infinitivo de la verboj |

**6 Skribu frazojn** per la datoj, uzante la korektajn tempojn de la verboj kaj la tagojn de la semajno.

Hodiaŭ .......... , .........., la .......... de .......... de ..........

Hieraŭ .......... , .........., .......... de .......... , ..........

Morgaŭ .......... , ..........

Postmorgaŭ ..........

Antaŭhieraŭ ..........